

Kun Tiburcjusz Tyblewsky pri post-katastrofaj situacioj

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.05.03.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-168/Radiokasedo-168-9-86-B-1048-Claude-GACOND-kaj-Tiburcjusz-Tyblewsky-parolas-pri-post-katastrofaj-situacioj.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolas Claude Gacond kaj Tiburcjusz Tyblewsky.

Tiburcjusz, hodiaŭ vi parolos al ni pri post-katastrofaj situacioj, ĉu ne ?

TT.- Jes. Mi intencas prezenti al vi la homon eksterordinaran. La homon, Kiu ekde dek jaroj riskas sian vivon por savi la aliajn. Roland Levreaud, loĝanta en Francio apud Bordojo, naskiĝis en la sama regiono en 1919. Li brave fuĝis el militkaptitejo en 1940. Post la milito li studis historion kaj geografion en bordoza universitato. Ĝis 1975 li estis fakinstruisto. Nun li estas vicprezidanto de Franca Esperanto-Instituto kaj aktivas multkampe.

Ĉar ne eblis intervjui lin senpere, ni petis liajn skribajn respondojn. Pardonu pro la anstataŭaĵo, sed eĉ tiel Roland Levreaud meritas aŭdebligi per niaj antenoj. Li ja estas unu el la ĉefaj animantoj de Internacia Urĝa Agado. Al mia kolego Gacond mi petas ke li legu la demandojn.

Cl.- Do, unua demando: Kiel vi kontaktiĝis kun Internacia Urĝa Agado?

TT.- Levreaud: Tuj post la dua mondmilito mi deziris partopreni parpacan laboron sub plejeble konkreta aspekto. Tial en 1945 mi restis unu monaton sur laborkampo de Internacia Civilservo: ni transformis korton de iama kazerno en porinfanan ludteron. 30 jarojn poste, laborinte laŭ mia disponeblo, mi liberiĝis kiel emerito ĝuste kiam Civilservo iniciatis Internacian Urĝan Agadon. Tute normale mi trovis mian lokon en tiu kadro.

Cl.- Demando: Kion vi faras dum tia urĝa agado?

TT.- Levreaud: Se mi apartenas al la tutunua skipo: kvarope manovrante elektronikan sondilon, ni traserĉas la ruinojn por malkovri postvivantojn kaj eltiri ilin el sub ŝtonoj aŭ betonaj traboj, kio okazis ekzemple dum suditala sismo en 1981. Ni flegas la vunditojn, malkonstruas la danĝerajn elstarajojn. Post inundo ni elpumpas la ŝlimon, purigas la domojn de senhelpaj izolitoj aŭ maljunuloj, senŝtonigas la herbejojn. Se mi intervenas kun dua skipo: ni rekonstruas domojn kune kun la tieuloj, strebante respekti la lokan manieron, tamen enkondukante pli sekurajn teknikojn, ekzemple en San Domingo en 1979. En Gvineo 1984 mi traktis kun la ministro pri koristruado por prezenti niajn planojn ellaboritajn surbaze de niaj diversaj spertoj dum dek jaroj en Centra Ameriko.

Cl.- Demando: Kiajn situaciojn vi trovas, venante al la katastrofitaj lokoj?

TT.- Levreaud: Unue okazas neevitebla kolektiva traŭmo akompanata de la plej malprudentaj reagoj. Tuj poste la momenta disfalo de ĉia socia kaj administra strukturo lasas lokon al la plej diversaj kondutoj. Aperas tute nova hierarkio, spontane elpaŝas iniciatemaj subuloj, dum aŭtoritatuloj ne kapablas ion fari senigite je sia kutima ordonaparato (telefono, ŝoforo, sekretarioj, servistoj). Eksteroroinara situacio nudigas la homojn: iuj pretaj senskrupule tiri

ĉian eblan profiton je la kosto de la trafita kolektivo, aliaj sinforgesemaj kaj sindonemaj. Influas la socipolitika kadro: Ju pli evoluinta lando, des pli fragila piramido. En la tiel nomataj modernaj landoj, la homoj ĉion atendas de la ŝtato. En Afriko, en Centra Ameriko, kelkajn horojn post la sismo aŭ ia ciklono, la postvivanta familio ekfosas argilon por tuj rekonstrui kabanon. En Eŭropo la posedanto ofte malpermesas, ke ni tuŝu ion en lia domo ĝis la ekspertizo de la asekurkompanio aŭ de ŝtatoficisto.

Cl.- Demando: Kion atendas la savatoj?

TT.- Levreaud: Krom la plej urĝaj elementaj bezonoj (manĝaĵoj, kuraciloj, kovriloj), pli ol supozeble gravas homa kaj humana ĉeesto el ekstero. La trafitaj homgrupoj ĉiam sin sentas forgesitaj de propra altinstanco. Ke aliaj homoj forlasis hejman komforton, venis de malproksime por helpi sen kaŝita celo, dividante la primitivajn vivkondiĉojn de la aŭtoktonoj, streĉe laborante kun ili, tio tre pozitive eĥas kaj kontribuas redoni al la koncerna kolektivo koheron kaj denovan fidon al la estonto.

Cl.- Demando: Kiuj ecoj necesas fakte al savanto?

TT.- Levreaud: Adaptiĝemo, iniciatemo: en kelkaj horoj oni frontu al situacio neĝuste perceptita en la ĉefurbaj oficejoj de la vundita lando. Ne facilas atingi la trafitan punkton. Tiam oni tuj improvizu: kie, kiel oni plej utilos? Sperto multe helpas, sed ĉiu situacio estas aparta. Memregado, pacienco, diplomateco: dum ies vivo pendas je kelkaj minutoj, oni fojfoje perdu unu horon, argumentante kun iu malfidema, hezitema, nekapabla galonulo, kiu disponas ŝlosilajn rimedojn.

Cl.- Demando: Ĉu estas io komuna en la maniero travivadi katastrofojn?

TT.- Levreaud: Kiel ajn diversas la katastrofoj kaj la landoj, frapas la komuna aplombo de la registaroj. Ĉiuj kutimas pretendi: "Ni regas la situacion", eĉ se absoluta ĥaoso regas la trafitan areon. Ne fidu la planojn ellaboritajn sub bombasta kodnomo en la industriaj landoj por fronti al ĉiuspecaj katastrofoj: kiam plagas la naturo, oni tuj retrosaltas en la Mezepokon, se ne eĉ en prahistorion. Dissplitiĝas la maldika ŝmiraĵo de civiliziteco.

Cl.- Demando: Ĉu vi foje utiligis helpon de esperantistoj?

TT.- Levreaud: Malofte. Mankas esperaristoj en la plej ofte trafitaj zonoj, mankas tempo por ligi kontaktojn, mankas komunikebloj ĝuste pro la katastrofo. Tamen restas ebloj; ekzemple post alarma depeŝo de iu presagentejo pri sismo en norda Italio en 1980, nia pariza sidejo demandis al mi, ĉu mi povas akiri informojn dank'al esperantista reto. Pere de adresaro kaj telefono mi atingis du esperantistojn kaj komunikis post kvardek minutoj fidindajn elementojn.

Cl.- Demando: Ĉu vi mem travivis iam panikon?

TT.- Levreaud: Panikon neniam mi spertis dank'al nura hazardo. Sed profundan aflikton kaj konsterniĝon, jes, vidante abismon inter kiom la viktimoj atendis de ni, kaj kiom ni povis fari. Kiel forgesi la jenan inferan scenon? Nokto, neĝo falas sur Sanktan Anĝelon dei Lombardi - en suda Italio. Sub la blindiga blublanka lumo de kontraŭavia lumĵetilo ni sondas dancejon, sub kies ruinoj amasiĝis sesdeko de gejunuloj. Nepra silento: ĉiuj maŝinoj kaj homoj

senmoviĝis, ke aŭdiĝu en niaj aŭskultiloj la plej eta vivsigno. Nigras la vestoj de la atendantaj virinoj, ankoraŭ pli nigras - ĝis netolereolo - iliaj angoraj rigardoj magnete najlitaj al ĉiu gesto nia. Ni nepre evitu mimi ion, kio povus levi esperon ĉe la ĉeestantoj. Kvazaŭ ni tenus en niaj manoj vivon aŭ morton. Sed, escepte de la parazitaj bruoj, neniuj vivsignoj: Kiel nun fronti al la duoncirklo el rigardoj, kiuj pezas sur nin? Absurda, sed ne forigebla kulposento...

Cl.- Demando: Kiel esperantistoj povus kontribui al Internacia Urĝa Agado?

TT.- Levreaud: La geesperantistoj strebu akordigi sian humanismon kun kruela ĉiutaga realo. Ili laŭeble konkretigu ĝin. Se ili loĝas en riskoplenaj landoj aŭ regionoj, ili ekrilatu kun ni: ili povos efike faciligi nian intervenon.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis Claude Gacond kaj Tyburcjusz Tyblewski pri Roland Levreaud. Ĝis la venonta sabato!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014